

TEA-BULTENO

7^A JARO

JANUARO-FEBRUARO 2004

NUMEROJ 1-2



Estu Paco kaj Amo en la Nova Jaro!

Plia nova jaro staras antaŭ ni! Kion ĝi alportos? Interesa demando, al kiu neniu kapablas respondi. Kion rezervas por ni la estonteco, malfacile oni povas diveni, kvankam per niaj agoj kaj faroj certe ni, foje kaj peze kaj kruele, influas la destinon de la tuta homaro. Eble "Iu" jam plugis la vojon, sed ni sendube povas interveni, aldonante florbedojn, fosante novajn stratojn, plantante junajn arbojn, por plibeligo kaj pliriĉigo de la tuta pejzaĝo.

Do, ni ĉiuj, plenumante ĉiutagan devon, ĉu familian, ĉu laboran, ĉu socian ĉu... idealan, kontribuas ke tiu jam difinita vojo pli belaspektu kaj servu por nuna kaj estonta bono. Sed tio povas havi siajn pozitivajn efikojn nur je mikrokosma dimensio, kio do rilate al la tutmonda situacio: militoj, malsatoj, polucio, detruado de naturaj riĉaĵoj, ĉiaspecaj diskriminacioj, manko de akvo, intergenta malamo...? Kiel kontribui por forigi tiujn malbenaĵojn? Ĉu ni, unuopule, havas la povon kaj kapablon kontraŭstari tiajn kaj ŝanĝi situaciojn kiuj jam de jaroj stagnadas kaŭzante malhomajn vivkondiĉojn? Jen gravaj demandoj, al kiuj nepras taŭga respondo: ni serioze pripensu!

Estu por vi kaj por ĉiuj viaj gekaruloj la nuna 2004^a Jaro plej bona, plej prospera kaj plej sukcesa!

Via Bulteno-redaktantino *Elda Doerfler!*

Karaj TEA-anoj!

En ĉi tiu unua numero de via Bulteno troveblas - kiel kutime - la programo por la nuna monato kaj la anonco pri la Jara Asembleo.

En la programo nenio speciale nova (*nu, kial vi mem ne proponas kaj direktas iun eron allogan kaj interesan?*), escepte de tiu okazonta la 30^{an} de januaro, nome: "Ni provu interpretadi!" Kiel sciante, mi ĉeestis en Ancona, komence de decembro, Seminarion pri interpretado, kio sugestis al mi provi ion (preskaŭ!) similan ankaŭ por vi. Plurajn fojojn, vole-nevole, okazas ke ni devu, sinsekve aŭ samtempe, traduki de Esperanto al itala kaj inverse, kaj plej ofte, la rezultoj estas (duon)katastrofaj. Do, ni provu plispertiĝi en tiu grava arto: eĉ se ni neniel sukcesos, tamen ni ekzercadis nin en praktikado de nia lingvo. Dua grava programero, kiel supre menciite, estas la Jara Asembleo, en kiu bonvolu multnombro partopreni, por ke ni povu kune decidi pri estontaj agadplanoj de nia Asocio. Kunportu entuziasmon, laboremon, sugestojn kaj help-sinproponojn, ĉar nur per via konstanta ĉeesto kaj kunlaboro eblas optimume aktivadi por la disvastigado de Esperanto.

ORDINARA JARA ASEMBLEO DE TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉe la 18^{an} de januaro 2004 je la 10.30 en unua kunvoko kaj respektive je la 11^a en dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2003:
 - a) Morala raporto de la prezidanto (*Edvige Ackermann*)
 - b) Agadraporto de la sekretario (*Elda Doerfler*)
 - c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto (*Giuseppe Valle*)
 - ĉ) Raporto pri la libro-fako (*Giuseppe Valle*)
 - d) Deklaracio de la revizoroj (*Amalia Zerpini - Elio Nocent*)
 - e) Raporto de la triesta katedro (*Elda Doerfler*)
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

DELEGILO

La asociano _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la
Jara Asembleo de TEA, okazonta
dimanĉon la 18^{an} de januaro 2004.

Subskribo _____

Dato _____

Notu bone! Okaze de la Asembleo eblos pagi la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membreco, abononj al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp.

Programo en Tea - Januaro

02 - vendredo	Sidejo fermita
04 - dimanĉo	h. 11.00 - Esperantlingva Di-Servo ĉe preĝejo BEATA VERGINE DELLE GRAZIE - Via Giustinelli
06 - mardo	Sidejo fermita
07 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
09 - vendredo	h. 20.00 - Estrarkunsido
13 - mardo	h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
14 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
16 - vendredo	h. 20.00 - Niaj aranĝoj - prezentas Anita
18 - dimanĉo	h. 10.30 - Jara Asembleo en TEA
20 - mardo	h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
21 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
23 - vendredo	h. 20.00 - <i>Lecturae Dantis</i> en Esperanto
27 - mardo	h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
28 - merkredo	h. 18.30 - Koruso "Verdaj Anĝeloj"
30 - vendredo	h. 20.00 - Ni provu interpretadi!
Ĉiulunde kurso de esperanto ekde la 19^a horo.	
Ĉiuvendrede progresiga kurso de esperanto ekde la 18^a horo.	

POR PLI VASTA KOMUNUMO

Kial finfine mi devus aliĝi al:

- ▶ la loka Esperanto-klubo?
- ▶ la nacia landa asocio?
- ▶ la asocio de mia fako aŭ hobio?
- ▶ Universala Esperanto-Asocio?

EKZISTAS ALMENAŬ DU BONAJ KIALOJ.

La Esperanto-asocioj je ĉiuj niveloj laboras por pli bona mondo, por mondo sen lingva kaj kultura diskriminacio, unuvorte ili laboras por LINGVA DEMOKRATIO.

Se vi opinias, ke tio estas bona celo, vi certe volas subteni ilin. Aliĝante al via loka klubo aŭ al la nacia, faka aŭ monda asocioj (eventuale eĉ al ĉiuj tiuj), vi estos parto de tiu tutmonda Esperanto-movado, kiu de pli ol unu jarcento laboras por lingvaj homaj rajtoj je ĉiuj niveloj, kaj provas konvinki la mondon, ke ankaŭ en la lingva-kultura kampo justeco valoras pli ol forto.

Samtempe vi eble ŝatas simple esti parto de la komunumo, kiu parolas la internacian lingvon Esperanto. Vi eble ŝatas renkonti aliajn parolantojn de Esperanto, vi ŝatas aĉeti librojn en Esperanto, vi ŝatas vojaĝi al fremdaj landoj kaj koni ties loĝantojn kaj eventuale eĉ esti gastigata de lokaj esperantistoj. Ĉion ĉi la membroj de Esperanto-asocioj faras tute nature, ĉar ili estas daŭre informataj pri la revuoj, la libroj, la kongresoj, la ret-listoj kaj la ret-paĝoj, la korespond-anoncoj kaj la vojaĝ-eblecoj.

LA EBLAJ MEMBRO-KATEGORIOJ DE UEA:

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Eo-movado
MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29

jaroj, membro de TEJO kun la revuo KONTAKTO sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo ESPERANTO

DM(-T): Dumviva Membro pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon ESPERANTO, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon KONTAKTO kaj TEJO TUTMONDE

SA: Simpla abono al la revuo ESPERANTO, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo KONTAKTO, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas UEAmembrecon)

PT: Patrono de TEJO : pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon KONTAKTO kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

PLIA MODERNA SERVO

La revuo ESPERANTO estas abonebla ankaŭ en elektronika formato. Individuaj membroj-abonantoj de UEA rajtas aldone kaj senpage mendi la revuon en unu el la elektronikaj formatoj oportuna por ili. La mendojn akceptas la ret-adreso reto@uea.org. La elektronika revuo estas sendata al la mendintoj rete baldaŭ post la finredakto de la papera versio kaj antaŭ ol ĝi dissendiĝos per ordinara poŝto. Komprenoble, spertinte la novan servon, ili rajtas ankaŭ rezigni pri ricevado de la papera versio. La elektronika versio de la revuo estas abonebla ankaŭ por la esperantistoj loĝantaj en B-landoj, kiuj ne estas membroj de UEA aŭ abonantoj de la papera versio de la revuo. La kosto de la servo estas fiksita kiel duono de la B-landa abonkotizo: 7,50 euroj.

KOTIZOTABELO DE UEA POR ITALUJO EN 2004

MG - € 9; MJ(-T) € 22; MA(-T) - € 54; SA - € 34; Kto € 20; SZ - € 108; PT - € 66

Por pliaj informoj kaj mendoj, turnu vin al TEA-kasisto

BOULOGNE 2005 ESPERANTO

La Nordfrancia Esperanto-Federacio organizos en 2005, dum la paskaj festoj, ekde vendredo la 25^a ĝis merkredo la 30^a de marto, okaze de sia ĉiujara federacia kongreso, elstaran internacian amikecan renkontiĝon, por memorfesti la centjariĝon de la

unua Universala Kongreso de Esperanto de 1905.

Partoprenas en la organizo de tiu evento, krom la Nordfrancia Federacio, ankaŭ SAT-AMIKARO (kiu tiam okazigos sian 60^{an} kongreson), Unuiĝo Franca por Esperanto (aranĝanta sian nacian inter-asocian kongreson) kaj la belga kaj brita Esperanto-asocioj (kadre de escepta Markola kongreso).

Ĉiuj samideanoj, kiuj deziras paŝi "laŭ la paŝoj de Zamenhof", estas invititaj partopreni la eventon. Baldaŭ estos eldonitaj la aliĝiloj. Sed jam ekde nun ĉiu povas sin informi vizitante la allogan TTT-ejon:

<http://boulogne2005.online.fr>

Jam nun notu en via agendo pri tiu ĉi historia evento okazonta Paske de la jaro 2005!

Informis Xavier DEWIDHEM, Komisiito pri Informado kaj Komunikado, Organiza Komitato de Boulogne 2005. Rete: boulogne2005@online.fr

Interesaj konsideroj de Claude Piron pri Universala, Internacia, Tutmonda

Thierry Salomon mesaĝis pri la problemoj de la adjektivo, kiu karakterizu Esperanton. Kiel vi eble scias, mi siatempe esploris pri la reagoj de homoj al la vorto ESPERANTO kaj al diversaj manieroj karakterizi ĝin. El tio montriĝis, ke la plej malbon-efika (laŭ nia vidpunkto) vorto estas **universala**, ĉar homoj perceptas en ĝi deziron anstataŭigi ĉiun alian lingvon, kaj ĉar la vorto estas mense ligita al konceptoj kiel *ĉiuj*, *ĉio*, *tutaĵo* (kiel konfirmas la vortaraj difinoj), kio estigas en la menso reagojn kiel “Se tiu lingvo okupas la tutan lokon, kie estos loko por mi?” aŭ “Ĝi volas konkuri la tutan mondon, tio estas timiga”. Tiuj ligoj kun tuteco aŭ ĉioeco venigas ideasociojn pri totalitarismo, imperiismo, absolutismo.

Poste, en la vico laŭ malbona efiko, venas **tutmonda**, kiu ĉe multaj ankaŭ havas negativajn elvokaĵojn, kvankam ĉe aliaj ne (ili trovas, ke rigardi la anglan tutmonda lingvo ne estas io negativa). Poste venas **internacia**, kiu ankaŭ povas impresi kiel havanta emon forigi la naciajn lingvojn, tamen multe malpli ol **universala** kaj **tutmonda**. La vortoj, kiuj ne havis malfavoran efikon rilate al Esperanto estis la vortoj **interpopola**, **interkultura**, **transnacia**, **intergenta**, **interetna**. Kompreneble, en la esploro mi uzis naciajn lingvojn. Mi tiutempe ne pensis pri vortoj kiel **pera**, **intera**. Eble en la franca estus bona **langue intermédiaire** aŭ **langue-truchement**. Same, **artefarita lingvo** estigis la plej malfavorajn reagojn, iom pli favora estis **planlingvo**, sed la esprimo, kiu montriĝis plej pozitiva, estis **konvencia lingvo**. Bedaŭrinde, tiu nun povas elvoki ion alian ol tion, kion ĝi oficiale signifas, ĉar oni komencis, en multaj lingvoj, uzi la vorton **konvencia** kun la senco *tradicia*, *klasika*, *jam-de-longa*, pro influo de la angla lingvo. Mi supozas, ke anglalingvano, kiu aŭdas la esprimon **conventional language** riskas kompreni ĝin, ne kiel “lingvo alprenita per interkonsento, laŭ konvencio inter interesatoj” sed kiel “lingvo tradicie uzata”.

La vortoj, kiujn ni uzas, estas gravega faktoro en la reago, kiun ni estigas. Estas tre bedaŭrinde, ke tion esperantistoj ne konsciis en la komenco, kaj ankoraŭ nun ne bone konscias. Vorto estas pli ol vorto: Vorto estas prembutono, kiu venigas en la menson riĉajn seriojn da latentaj reagoj, da juĝoj, da starpunktoj. Vorto povas akceli la koron kaj altigi la sangopremon. En nia informado, estas do grave atenti pri ili.

6^a TutAmerika Kongreso de Esperanto
Havano, Kubo - 21^a-27^a de marto 2004

Kongresa temo:

Kia Esperanto-movado por Ameriko?

Kongresejo: Internacia Gazetara Centro

Post tiom da eŭropaj kongresoj, jen ŝanco esperantumi en pli varma lando, sub pli bluaj celoj. Amerikaj esperantistoj renkontiĝos en Havano kun la celo debati niajn problemojn, eltrovi vojojn por la disvastigo de Esperanto. Kaj ankaŭ, kial ne? sunbruniĝi, konatiĝi kun urbo, kies malnova parto estas deklarita de Unesko HEREDAĴO DE L' HOMARO.

Ĉu la problemoj kiujn alfrontas la landaj asocioj en Ameriko estas la samaj kiel en Eŭropo? Ĉu la meza esperantisto estas la sama? Ĉu ili alvenas al nia movado pro la samaj interesoj? Kiel plialtigi la membraron? Kia maniere helpi la movadon en landoj kun ĵus burĝonantaj asocioj? Kion alportas la kulturoj de niaj landoj al nia komuna trezorujo? Jen kelkaj el la demandoj, kiuj provos trovi respondojn dum la kongreso, pere de prelegoj, rondtablaĵoj, diskutoj, koridoraj aŭ ĉetablaj babiladoj, ktp. Ni ĉiuj profitos de viaj ideoj kaj sugestoj! Fakte dum TAKE en Havano, vi havos la ŝancon partopreni debatojn kaj prelegojn pri tiu ampleksa temaro, kiu tamen rondiras ĉirkaŭ la sama akso: “Esperanto en Ameriko”; “Kiel prezenti Esperanton al la ĝenerala publiko?” “Ĉu prezenti, aŭ defendi ĝin?”; “Ĉu entute estas ŝanco por Esperanto en kontinento tiel supersŭtita per la angla lingvo?”; “Se Esperanto ne nur estas lingvo, kiuj estu niaj edukaj kaj kulturaj celoj dum ĝia instruado?”; “Kian rolon havu nia junularo?”.

Sed ne ĉio estos prelegoj kaj debatoj. Kompreneble vi ankaŭ bezonas ekskursi kaj esplori la urbon, rigardi ekspoziciojn, aĉeti artaĵojn: nu, estos tempo ankaŭ por tio!

Interesitoj bv. kontakti la Lokan Kongresan Komitaton:

Kuba Esperanto-Asocio

6^a TutAmerika Kongreso de Esperanto
Poŝtfako 5120 - CU-10500 Havano - Kubo
Telefono: ++53(7)40 4484; Fakso: 33 8729
el. poŝto: kubesp@enet.cu

Lastatempa grava informo, ĉefe por esperantaj kolektantoj! La kuba telefonkompanio kaj KEA subskribis kontrakton por eldono de telefonkartoj kun la simbolo de la kongreso sur bela foto de Zamenhof. La kartoj aperis tutlande en eldonkvanto de 250 mil, kio konsistigas bonan senpagan propagandon pri la kongreso tutlande kaj aliflanke! Baldaŭ eblos vidi la karton rete kun informoj pri ties aĉeto.


Por kiuj interesiĝas pri aliĝmaniero al TAKE, sendu mesaĝon al nia aŭtomata respondilo kun temlinio “aligxo” kie vi trovos la aliĝilon: sistema@cied.rimed.cu. Nuntempe la kubaj esperantistoj sin preparas por bonvenigi partoprenantojn kiuj jam sin anoncis el diversaj eŭropaj kaj amerikaj landoj!

Amike kaj Amerike, salutas la prezidanto de LKK

Maritza Gutierrez González

De kiam TAKE?

La TUTAMERIKAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO ĝuas tradicion de pli ol dudek jaroj. Post la du unuaj - sub la nomo de Amerika Kongreso, kaj sen difinita ofteco - ekde la 3^a TAKE okazinta en San José, Kostariko 1996, tiuj eventoj estas regule programitaj ĉiun trian jaron laŭ geografia ordo: Centrameriko-Karibio, Sudameriko kaj Nordameriko. En Kostariko oni decidis nomi la kongresojn tutamerikaj. Rezulte de tiu decido, la 4^a TAKE (1999) okazis en Bogoto kaj la 5^a (2001) en Meksik-urbo. Kaj nun en Havano, Kubo, la lando de la plej entuziasmaj, viglaj, aktivaj kaj amikiĝemaj esperantistoj el tuta Esperantujo!



Mallonge pri...

Esperanto inter aliaj lingvoj dum koncerto en Västerås Dank'al la turneo de la bardo Mikaelo Bronstejn tra Svedio la klubo en Västerås havis eblecon interesigi la ĉefon de la koncertdomo organizi programon kune kun Mikaelo, Kaj Stridell, kaj la Duo Diverslingve. La rezultoj de la kontaktoj kun la organizo VÄSTMANLANDSMUSIKEN estas, ke la koncerto okazos la 17^{an} de januaro. Laŭ la titolo "Muzika vojaĝo tra Eŭropo", oni kantas en diversaj lingvoj, inter ili ankaŭ Esperanto.


Esperanto oficiala laborlingvo en EU Esperanto estis unuafoje laborlingvo en Eŭropa Unio, okaze de transnacia programkonferenco de la Radikala Partio, 7-8 dec. 2003 en Bruselo: la profesia interpretisto A. Tsirimokos stakanovisme laboris dum 17 horoj! La Radikala Partio formaligis la inkludon de Esperanto kiel EU-lingvo en sian programon por la balotoj 2004.

Kiom da homoj parolas Esperanton en Litovio? En 2001 okazis tutlanda registrado de la loĝantaro. Inter dekoj da diversaj demandoj oni enketis pri scipovataj lingvoj. Nun statistika ŝtat-departemento aperigis tre detalan analizon pri la rezultoj. Laŭ ĝi en Litovio oni scipovas 41 lingvojn. Estas interese, ke Esperanto en tiu statistiko okupas la 16^{an} lokon laŭ kvanto de scipovantoj de lingvoj. Sekve en Litovio estas 858 personoj, kiuj konas Esperanton.

Nova-malnova ĝenerala direktoro en Roterdamo Osmo Buller estis ĵus anoncita kiel la nova Ĝenerala Direktoro de UEA. Li ekoficos ekde la 1^a de aprilo 2004, kiam Roterdamon forlasos lia antaŭulo kaj samtempe posteulo Trevor Steele. La 23^{an} de decembro la estraro de UEA anoncis al la komitato la decidon, faritan la antaŭan tagon. Tuj poste aperis la unuaj gratuloj de komitatanoj. "La plej bona novaĵo de la lastaj du jaroj! Reveno de tiom da sperto, kvalifiko kaj energio esperigas pri baldaŭa mildigo de la krizo kaj eĉ pri rekresko", komentis Aleksandr Korĵenkov. La estraro tamen daŭre ne malkaŝas, kiom da kandidatoj efektive anonciĝis.

Nova ZEO en Prilep-Makedonio Antaŭ kelkaj tagoj en Prilep aperis nova ZEO. Sur la marmora plato de la tombo de s-ro Kiro Trpĉeski estis ĉizitaj la jenaj vortoj: "Kiro Trpĉeski eminenta esperantisto". Profesie li estis juvelisto kaj ekstudis Esperanton jam en la jaro 1924^a. Lia instruisto estis s-ro Svetislav Petroviĉ el urbo Pirot (Serbio). Li krome estis kunfondinto en 1963 de E-societo LA PROGRESO en Prilep.

OSIEK-PREMIO 2003

 En 2003 la OSIEK-anoj proponis 25 verkaĵojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de LA GAZETO. La 24^{an} de julio, dum IEK en Prago, Ĉeĥa Respubliko, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Gerrit Beverling

pro

ANTOLOGIO LATINA

La premio, 500 eŭr., rekomencas vivantan aŭtoron pro publikigita verkaĵo ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro.

Informis: LA GAZETO, FR-55210 Creuĉ—Francio

Eŭropa Bunto bezonas vin!

Certe vi jam aŭdis pri la manifestacio EŬROPA BUNTO, nome tiu eŭrop-skala manifestacio okazanta en Strasburgo la 9^{an} de majo 2004. Ĝi estas organizata ĉefe de esperantistoj, kun apogo de EŬROPA ESPERANTO-UNIO kaj celas kunigi ĉiujn eŭropajn Esperanto-asociojn kaj ankaŭ ĉiujn neesperantistajn asociojn, okupigantajn pri lingvoj. La hejmpaĝo de <http://europa.bunto.free.fr> jam disponeblas en 30 lingvoj de Eŭropa Unio (kaj baldaŭ eĉ pli), kaj vi ne hezitu jam anonci tuj la partoprenon de via asocio: ni ĝin aldonos ĉe la paĝo <http://europa.bunto.free.fr/asocioj.htm>.

Per tiu manifestacio, oni montros la lingvan diversecon de la nova Eŭropa Unio (kiu tiam estos 20-lingva oficiale) kaj espereble konsciigos la publikon (kaj eble politikistojn) pri la fakto, ke necesas agi por konservi tiun mult-lingvecon, ampleksantan certe pli ol 50 lingvojn anstataŭ tiuj 20 oficiale permesataj. Plie, tiuj permesataj lingvoj fakte estas minacataj de la nuna politiko de Eŭropa Unio, kiu privilegias nur kelkajn lingvojn ĝis nunura lingvo-hegemonio. Ju pli da homoj kaj da asocioj partoprenos tiun manifestacion, des pli ĝi estos efika: esperantistoj estas inicitintoj de tiu agado, sed ni invitu plej multe da homoj (ĉu esperantistaj ĉu ne). La sukceso de tiu grava eŭropa evento dependas nur de ni!

Do, por kontakti ĉiulingvajn ne-esperantistajn asociojn, ni bezonas landajn (kaj eble ankaŭ regionajn aŭ eĉ lingvajn, se eblas) kunordigantojn. Ĉiu intereso iĝi landa (aŭ regiona/lingva) kunordiganto anoncu sin al: europa.bunto@eraro.com. La landaj organizantoj estu prefero esperanto-parolantoj (sed ne nepre) ĉar la ĉefa laborlingvo por la organizado de la manifestacio estas Esperanto (la kunordigantoj poste utilos, kiel perantoj por la aliaj lingvoj).

La tasko de landa kunordiganto estas sufiĉe simpla:

- ✓ informi (kaj inviti) sialandajn esperantistojn, Esperanto-klubojn, ktp. partopreni en la manifestacio (artikoloj ĉe gazetoj, mesaĝoj al dissendolistoj);
- ✓ inviti la pri-lingvajn asociojn de sia lando al la manifestacio;
- ✓ zorgi pri la fakto, ke ĉiu partoprenonta asocio kreu siajn banderolojn kaj panelojn por la manifestacio;
- ✓ informi la manifestacian kunordiganton (europa.bunto@eraro.com) pri kiuj asocioj venos, pri kiom da homoj proksimume el ĉiu lando venos;
- ✓ eventuale organizi komunajn transportojn al Strasburgo por sialandaj partoprenantoj.

Tuj sinanoncu almenaŭ unu kunordiganto por ĉiu EU-lando. La Bruksela Komunidadcentro (BKC) regule sendos novaĵojn pri la pretiĝo de la manifestacio.

Informis: de Henri De Sabates Rete: hodos@free.fr

Atentu! Atentu!

Aldone vi trovos folion kun kvizo kaj ties regularo. Se vi sukcesos ĝin solvi kaj sendi la rezulton de via serĉado kiel eble plej frue al la indikita adreso, vi gajnos premion!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Coroneo 15 - 34133 Trieste

tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@estelnet.it

<http://arte.triesteincontra.it/esperanto>

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio

Poŝtekonto N° 10834349

LERNI GEOGRAFIE

Jen la regularo de la konkurso:

1. La italaj provincoj estas 103 laŭ la aldonita listo.
2. Inter la nomoj de tiuj Provincoj, serĉu tiujn, kiuj havas esperantan signifon. Ekzemple: Bari
3. Fari etan frazon uzante tiun vorton sen ŝanĝi ĝin. Ekz: "Bari la vojon" estas korekta. "Oni baris la vojon" estas malkorekta
4. La lasta dato valida por la sendado de la solvo estas la 29^a de februaro 2004.
5. La gajnant(in)o estos tiu, kiu—unua kaj plej frue—sendos la korektan solvon.
6. Sendu la solvon al unu el la jenaj adresoj:
 - a) Pier Giorgio Soranzo, Via Vittorio Veneto 4 - IT-33050 Bagnaria Arsa UD
 - b) lucido@adriacom.it
7. La premio estas 50,00 (kvindek) eŭroj!
8. La verdikto ne estas kontestebla.

Listo de la italaj provincoj

- | | | | | |
|-------------------|------------------|-------------------|---------------------|--------------------|
| 1. Agrigento | 22. Catania | 43. Latina | 64. Perugia | 85. Siracusa |
| 2. Alessandria | 23. Catanzaro | 44. Lecce | 65. Pesaro-Urbino | 86. Sondrio |
| 3. Ancona | 24. Chieti | 45. Lecco | 66. Pescara | 87. Taranto |
| 4. Aosta | 25. Como | 46. Livorno | 67. Piacenza | 88. Teramo |
| 5. Arezzo | 26. Cosenza | 47. Lodi | 68. Pisa | 89. Terni |
| 6. Ascoli Piceno | 27. Cremona | 48. Lucca | 69. Pistoia | 90. Torino |
| 7. Asti | 28. Crotone | 49. Macerata | 70. Pordenone | 91. Trapani |
| 8. Avellino | 29. Cuneo | 50. Mantova | 71. Potenza | 92. Trento |
| 9. Bari | 30. Enna | 51. Massa Carrara | 72. Prato | 93. Treviso |
| 10. Belluno | 31. Ferrara | 52. Matera | 73. Ragusa | 94. Trieste |
| 11. Benevento | 32. Firenze | 53. Messina | 74. Ravenna | 95. Udine |
| 12. Bergamo | 33. Foggia | 54. Milano | 75. Reggio Calabria | 96. Varese |
| 13. Biella | 34. Forlì-Cesena | 55. Modena | 76. Reggio Emilia | 97. Venezia |
| 14. Bologna | 35. Frosinone | 56. Napoli | 77. Rieti | 98. Verbania |
| 15. Bolzano | 36. Genova | 57. Novara | 78. Rimini | 99. Vercelli |
| 16. Brescia | 37. Gorizia | 58. Nuoro | 79. Roma | 100. Verona |
| 17. Brindisi | 38. Grosseto | 59. Oristano | 80. Rovigo | 101. Vibo Valentia |
| 18. Cagliari | 39. Imperia | 60. Padova | 81. Salerno | 102. Vicenza |
| 19. Caltanissetta | 40. Isernia | 61. Palermo | 82. Sassari | 103. Viterbo |
| 20. Campobasso | 41. L'Aquila | 62. Parma | 83. Savona | |
| 21. Caserta | 42. La Spezia | 63. Pavia | 84. Siena | |